Conrad Ferdinand Meyer,

# Paco sur la Tero

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kiam la paŝtistoj sian
Gregon lasis kaj la Dian
Vorton portis tie iam
Tra la pordo de kaban'
Al patrino kaj infan',
Kantis plu la anĝelar'
Kun promes' al la homar':
"Paco sur la Ter' por ĉiam!"

Kantis tiel l' anĝelar',
Spertis tamen la homar'
Kiom da sufer' de tiam
Pro milito kaj malam'
En la Sankta Nokto jam!
Kantis ili petegante
Kaj mallaŭte akuzante:
"Paco sur la Ter' por ĉiam!"

Estas tamen daŭra kredo,
Ke la malfortul' ne predo
De perforto estu ĉiam.
Batos iam ties horo,
Eĉ en murdo kaj teroro
Da justec' enestas io.
Estos hom-generacio,
Kiu pacon serĉos iam.

Malrapide ĝi formiĝos,
Ĝia tasko plenumiĝos.
Forĝos ĝi armilojn iam,
Kiuj estos sen danĝer',
Kiuj portos al la Ter'
Pacon, kiu ne plu ĉesas,
Kiel l' anĝelar' promesas:
Paco sur la Ter' por ĉiam!

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Friede auf Erden" de* Conrad Ferdinand Meyer *(Konrado Ferdinando Majero, ∗1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2003-12-12.*

*MR-411-1 / Arg-101-206 (2005-08-01 13:06:34)*

*Conrad Ferdinand Meyer estis svisa poeto, verkisto kaj tradukisto, kiu naskiĝis en la svisa urbo Zuriko (Zürich), verkis precipe en la germana lingvo lirikaĵojn kaj romanojn, sed ankaŭ romanojn en la franca lingvo. Pliaj detaloj pri lia vivo troveblas en la interreto interalie en* `http://www.xlibris.de/Autoren/Meyer Meyer-Biographie/Meyer-Biographie-03.htm`.